
DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ N-ro 3 (834) 2002 ✪

## GENOCIDOJ



**Respondoj al letero, informoj, eventoj, prediko, protokolo, vivo de KELI**

# KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Jacques TUINDER
⊠ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerk ✆+31 251 231941;
🖳 d.tuinder-dekker@wolmail.nl

**Sekretario:** Els VAN DIJK-KUPERUS
⊠ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando; ✆+31 1724 20222;
🖳 j.a.van.dijk@hetnet.nl

**Kasisto:** Siegfried KRÜGER
⊠ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn, Germanio; ✆+49 7131 162688;
🖳 slkrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- ✪ Membro-subtenanto €30,- ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- ✪ pagante al Libroservo €18,- Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908 dumonata revuo — ISSN 0167-9554**

**Redaktoro:** Philippe COUSSON
⊠ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆+33 (0)5 49 46 80 21;
🖳 diaregno@altern.com.

**Abonprezo** sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado kaj ekspedado:**

Eldonejo hejme Kazimierz LEJA
⊠ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
✆+48 32 763 37 13; 🖳 hejme@inetia.pl


## ENHAVTABELO


51 Kiujn genocidojn kaj maljustaĵojn Dio devus malebligi?
Raporto pri trajna diskuto
de Armando ZECCHIN

55 La Remonstrantoj
Nederlanda Eklezio
de Gerrit BERVELING

57 Respondoj al „Kiu KELI? Kiu Dia Regno?"
Interŝanĝo de opinioj, daŭrigenda

67 Pentekosta prediko en Friedrichstadt
de Gerrit BERVELING

kaj informoj el la esperanto-movado, el la vivo de KELI, ktp.


## REDAKTORAJ VORTOJ

Ĉi tiu numero aspektos tre diskuteca.

Unue, raporto pri „filozofia" diskuto en trajna vojaĝo, pri tre grava temo.

Kompreneble, viaj reagoj estas bonvenaj.

Due, mi ricevis plurajn reagojn al aperinta teksto, kiujn mi publikigis. Vi povas konstati ke inter nia legantaro troviĝas tre diversaj opinioj. Tio almenaŭ pruvas, ke vi legas. Sed tio ankaŭ pruvas, ke la kristanaj esperantistoj estas homoj kun opinioj, kun konvinkoj. Kaj mi multe aprezas, ke tiujn konvinkojn oni dividas.

Krome, vi trovos ankaŭ preparojn al la kongreso.

Ankoraŭ alvenis rememoraĵoj pri nia kara frato David, kiu al ni tre mankas.

Post la husana eklezio, ĉi foje la remonstrantoj prezentas sin al vi. Ni atendas kontribuojn pri via propra eklezio aŭ tradicio.

Plej korajn salutojn, kaj bondezirojn por la ferioj (almenaŭ en Eŭropo).

P. C.



# DISKUTO

## KIUJN GENOCIDOJN KAJ MALJUSTAĴOJN DIO DEVUS MALEBLIGI?

**Dum interkupea konversacio ses kunvojaĝantoj serĉante frapas ĉe ekzistomistero.**

La diskutado falis, aŭ iuj el la konversaciantoj ĝin faligis, sur unu el la asertoj ĵus legitaj el la biografieto pri Primo LEVI, rakontita en la revuo foliumata de la manoj de unu el la vojaĝantoj, eble samgrupanoj, sur la trajno Romo — Vieno. Ĝuste en tiu biografio estis evidentigita penso-juĝo, kiu jam svarmis vaste tra la mondo ĉar ripetita kaj foje laŭde aprobita de seriozaj verkistoj kaj informiloj. Subtenas tiu penso, ke post Auschwitz (la ekstermejo, emblemo de ĉiuj similaj kampoj kie la nazioj provis kaj preskaŭ sukcesis plenumi la totalan genocidon de la judoj, kiu poste estis nomata ankaŭ Ŝoaho) oni ne rajtas plu paroli pri Dio, aŭ tiu ĉi ne plu meritas mencion aŭ aludon ĉar estis evidenta lia malĉeesto el la mondo de la suferantoj. Kelkaj opinias ke tia kritiko al Dio implicas, krom malaprobo pri lia nekomplemebla se ne cinika konduto, ankaŭ la neon pri la ekzisto mem de Dio.

La atenton, do, oni faligis sur tian aserton, pri kies logikeco kaj konsekvenceco sin trovis ĉiuj tiom aprobantaj ke unu-



*Armando ZECCHIN en Zagreb*

*(fotis P.C.)*

avide ŝajnis ke la temo provintus fermiĝi ĝuste pro la klara konsentita evidento. Sed timide estis enŝtelite ke, eble, Primo LEVI, fama itala juddevena verkisto, jam postvivinta de tiu tragika ekstermejo, intencis obĵeti ke Dio, ekzistanta aŭ ne, devintus interveni kaj malebligi tian masakron pro ĝia evidenta enormeco kaj scienca programiteco kaj pro ĝia esceptеco en la tuta homa historio. Tuj, al unu el la ĉeestantoj, pli malkvietigita tra la ordo de siaj pensoj ol klarigpete aŭ rebate, venis al la lipoj jena reago, sendepende de la vera penso de Primo LEVI: „Tio pensigas ke se la masakro estintus je dimensio malpli escepta kaj malpli vasta, eble Dio povintus legitime esti rajtigita, ĝuste de niaj juĝoj, resti for, kun indiferenta, se ne cinika, apartiĝo. Ĉu ankaŭ ni volas aspekti aŭ fariĝi nun cinikaj?"

La vorta elĵetaĵo ne ŝajnis komenta amuzaĵo kaj iom skrapis la konsciencojn ĉar ĝi lasis konsente pensema la ses amikojn. Tamen, eble la komuna hezitema aprobo estis pli aspekta ol reala ĉar akompanata de retenata rideto kaj de gestoj montrantaj ke konversaciantoj atendis el sia menso la preciziĝon de enmensaj formiĝantaj pensoj. Fakte al kelkaj elsksteriĝis dubo: „Kiam masakro ekkalkuliĝas proporcie granda kaj escepta? Primo LEVI (kaj aliaj) uzintus la saman valor-juĝon se li konsiderintus la masakron aŭ genocidon kontraŭ la Armenoj (1915-1918), en kiu mortigite pereis, nur!, unu miliono kaj duono da homoj (ĉar kristanaj)? Kien lokigi la diskrimo-punkto?"

Ĉi tie la embaraso estis ĝenerala kaj la dialogo procedis dispecete kaj per kurtaj frapaj frazoj, el kiuj jenas la suko: sendenpende de la nemarĝena demando laŭ kiu la problemo ĉiukaze devintus esti al-

metita jam tiuepoke por ke oni ne aspektu tiom egoisma ĝis alertiĝi pri la malbono en la mondo nur kiam ĝi frapas la hororiĝintojn mem, eĉ tiu genocido sin montris sufiĉe „granda", do taŭga por la pretendo pri la dia malebliganta interveno, almenaŭ por ke Dio daŭrigu ĝui la reputacion de kreinto kaj savanto.

Ĉi-punkte la observoj fariĝis subtilaj kvankam tra ŝerctonaj frazoj. Amuzigaj vortoj, entenantaj tamen seriozajn intuiciojn kiajn: se Dio malebligintus tiujn programitajn masakrojn, ili certe ne okazintus sed neniu scius ke ili estis malebligitaj kaj Dio daŭrigus resti obskura! Aŭ oni povus pensi ke Dio devintus interveni almenaŭ je la duono de la masakro; kaj kiu povus scii, ke ĉe tiupunkto la masakro estis atinganta sian duonparton koncedite, ke ni neniam scios ĉu estos okazonta alia dua parto? Kaj kiel scii ĉu Dio reale intervenis por malebligi pluan ekstermaĵon? Aŭ eble konvenas pensi, ke serioza Dio devintus interveni ekde la komenco, eĉ riskante resti neperceptata kiel ĉeestanta kaj aganta en la homaj eventoj. Tio ŝajnas pli kohera kun la postuloj kaj bezonoj de la homaro kaj kun la indeco de Dio mem.

Ankaŭ tiu konkludo, eltirita per nur ŝajna forgeso pri la seriozeco de la dramo jen rilate la oferbuĉatojn, ĉiuspecajn, jen rilate la supozitan indecon de Dio, aperis tuj konsentita kaj jam samopiniita de la ses sidiĝintaj, dum la trajno daŭrigis senperceptite transpaŝadi kilometrojn. Ĉe la kupea pordo vojaĝantoj premis por aŭskulti: eble pro la etoso ŝerce verva, eble pro la temo kutime publike ne priparolata, eble pro tio ke almenaŭ kelkfoje engaĝitaj pensadoj kaj diskutadoj ne disigas de la aliaj kaj ne devigas bagateliĝi por repreni akcepteblajn kontaktojn. Post senparolada momenteto, la sameco de opinioj komencis disfranĝiĝi ĉar iu volis reveni al la origina demando pri la „kvanto aŭ grandiozeco" de la maljustaĵoj kaj masakroj por ke estu dezirata kaj postulata la dian blokantan intervenon aŭ por ke Dio aŭtonome sin sentu devigata intermetiĝi. Kaj eksvarmis, el pluraj flankoj, dubigaj kaj problemigaj ekzemploj. Oni konsiderigas: se la programita elimino de judoj limiĝintus nur al cent miloj da ili, kiel, laŭ Primo LEVI, Dio devintus sinteni kaj konduti? Kaj se nur al dek miloj? Ankaŭ la germana (kaj suvetunia) agreso kontraŭ Pollando (kiom da mortigitoj?) meritas certe inkluziviĝi inter la „grandaj" ekscitantaj la dian enŝteliĝon, ĉu ne? Eĉ ĉiu milito disvolviĝas tra masakroj kaj kunpelas premisojn de estontaj maljustaĵoj kun estontaj militaj aŭ gerilaj reagoj k.s. Kial niaj filozofiadoj permesus ke Dio restu ekstere kaj indiferenta en tiuj malgrandaj kazoj, kaj male ne postuli ke li montru siajn ekziston kaj ĉeeston malebligante eĉ la „minorajn" (laŭ nia vorto) masakrojn?

Ĉiuj konsentis ke oni ne rajtas distingi kazojn gravajn disde kazoj malpli gravaj, se la mortigitoj estas amasaj. Sed la „esceptaj" cititaj aŭ aluditaj multobliĝis kaj ŝajnis ĉiuj egalaj. Laŭ mi, komencas iu el la surekzemplaj sinapogantoj, enviciĝas inter la „grandaj" ankaŭ la masakroj plenumitaj de la islamaj integristoj en Alĝerio ĉar mi ne sukcesas kredi ke tio koncedas al Dio sin malenŝteligi. Laŭ mi, alia daŭrigis, estas teruraj, tio estas subigendaj al la malebliganta dia blokado, eĉ la agresoj, modere masakrantaj!, plenumitaj de la mafio aŭ tiuj transverse venĝaj inter mafiuloj aŭ gerilanoj k.s. Mi, aldonas kelka, ne ekskludus la dian



devon interveni ankaŭ en la krimoj de teroristoj...

Ne prezentiĝis objetoj antaŭ tiaj konkludoj laŭ kiuj Dio devus montri sian ekziston kaj defendi sian honoron savante la homan integrecon ankaŭ en tiaj eventoj: se tio ne okazas, signifas ke mankas io en la universala ordo aŭ ke Li estas ne sufiĉe potenca!

Kaj tiel la penso ke „post Auschwitz" Dio estas procese persekutebla forvaporiĝis pro tio ke sur la benkoj de akuzitoj, certe kulpaj, oni devus lin kunpeli ofte, eble ĉiutage.

Kaj kial koncedis, implicite en niaj juĝoj pretendantaj ke estu malebligitaj almenaŭ la plej vastajn masakrojn, ke Dio forestu kiam ŝiro-ŝtelisto mortige frapigas, kvankam eble nevole, la kapon del maljunulino kontraŭ la ŝtona trotuaro? Kaj kial Dio ne devus malhelpi ke ruiniĝu la ponto ĝuste kiam dekoj da aŭtoj estas ĝin trapasantaj? Temas ĉiam pri homa sufero, ofte kaŭzata de homaj kulpoj, eĉ tiuj ĉi! Kial dispensi Dion en tiaj kazoj?

Kaj kiam sur la aŭtososea placeto misfortulo sin vidas inerta kaj senpotenca spektanto pri aŭtomobilo plonĝanta kaj mortiganta lian edzinon kaj lijan gefiletojn?

Se profunde konsideri, plue emerĝas el la konversacio, tiukampe ne troviĝas okazoj majoraj kaj minoraj (interkupeecaj esprimoj) ĉar la hona sufero okupas ĉiam la tutan animon de tiu kiu estas senkulpe frapita kaj de tiuj kiuj restas por plori. Eble endas taksi ne sufiĉe humana aŭ senigita je homaj sentemoj la opinio dispensanta Dion el lia devo interveni eĉ en „minoraj" suferoj, minoraj nur por kontisto. Dio estas, de niaj pliprofunfaj pensadoj, devigata interveni ĉiam kaj ĉie. Ĉu tio ne apartenas al la nocio mem de Dio?

Fronte al tia aserta demando, eltirita el faktoj eble vivitaj en unua persono, neniu dubis ke malkonsento estintus kontraŭlogika: fariĝis fakte pli kaj pli evidentaj partianeco, diskriminacio, preskaŭ rasismo vestita je justeco, kiam oni emas savi iujn kaj ignori aliajn kvazaŭ oniaj similuloj ne estus ĉiuj egalaj.

Kaj la konsideroj denove pliampleksiĝis ĉar se licas pretendi ke Dio intervenu por malebligi kiam estas pereanta homa senkulpa kaj senmalprudenta vivo maljuste frapita, kial ne rajtigi niajn pensojn pretendi ke Dio malhelpu ceterajn maljustaĵojn, foje pli dolorigaj ol la morto? Ni ekzemplu per senkulpulo kondamnita pro juĝa eraro aŭ, plej malplibone, pro falsa atesto, aŭ frapita en tenera aĝo de mortiga kancero aŭ incidento mortiga aŭ debiliga... Ne justas kaj ne eblas diskriminacii la suferojn: iuj forigitaj de Dio, aliaj ignoritaj de Li, laŭ niaj ne tute prudente koncedaj pensadoj. Ĉu tiu distingo estas farata por ne enmiksi Dion tro ofte en niajn aferojn, aŭ pro tio ke ni estas interesitaj pli rilate tion kio ŝmacas aŭ ekscitas evidentan problemon? „Ke Dio intervenu ĉiam kiam la homo suferas, eĉ la unuopulo!", estis la indig- kaj fier–plena lautvoĉo de la okaza parolanto.

Antaŭenirante laŭ tiuj konkludoj, unuanimis la konversaciantoj, oni finiĝas per postuli, kaj rajtigi kaj defii, ke Dio ŝanĝu la okazantaĵojn je ĉiu movo de folio, ĉar la okazoj de sufero estas sennombraj. Estis solenece deduktite.

Se validas tiu indukta rezonado, venis plua aldono, „el grandaj al mapli grandaj, kaj el perfortaj suferoj al ĉiuspeca sufero", necesas pli antaŭneniri ĝis

atingi almenaŭ kelkajn el la kaŭzoj de la suferoj kaj maljustaĵoj. Se pluhelpiĝi per ekzemplo: oni scias ke la fonto de maljustaĵoj (kun ĉio sekva) kuŝas en la interno de la homo kiu libervole (ĉi tie ne interesiĝas la penso-agoj ne libervolaj) ne kontraŭstaras aŭ sin fordonas al la altiro de la egoismo. Se la malbono naskiĝas tie-ĉi en nia eno, kial ni ne deziras kaj pretendas ke Dio malhelpu la naskiĝon mem de la malbono? Kial pretendi ke li malhelpe agu dum la malbono jam produktas siajn efikojn videblajn, anstataŭ ol bloki kaj nuligi ĝian fonton mem?

Ne facilis, antaŭ tiu argumentado, por la ses sin liberigi de la devo konsenti ĉar ne estas iu kiu ne dezirus ke la malbono, se tio eblas, ne estu forigata ek de ĝia naskiĝo. Ŝajnis nelogike ne konsenti. Nur post kelke da hezitoj ekaperis la dubo ke tia konkludo povas redukti la homon al simpla manekeno, tio estas senigita el la kapablo de decido: al li restus nur la kapablo elekti inter simpla bono kaj pli granda bono ĉar en la momento de la eventuala ekelekto pri la malbono, jen la dia blokanta interveno. Tiu sorto, ne estus aĉa sorto, eĉ estus feliĉa sorto, se ĝi similas, laŭ dikredantoj, al tiu de la beatuloj ĉe Dio, al kiuj eĉ ne prezentiĝas la tento pensi ka deziri la malbonon. Ĉu eblas perdi liberon por eviti la tento kaj la eblon fali en la malbonon?

Ni estas, daŭrigas la konversaciantoj, projektantaj — ĉu ankaŭ planantaj? — novan tipon de homaro. Por tio necesus ke Dio konceptintus kaj volintus homon tute alian. Tiukaze superfluus peti aŭ scius precize kion ni devas peti al Dio (se li vere estas): homo malpli libervola aŭ neniel libervola: libera nur en... en kio, se ne estas spaco por la libera decido malsama el la spontana impulso?

Malfacilas, tamen imagi agon en kiu ne videblas la devo respekti la aliajn... kie kuŝas ankaŭ la risko tion reglekti. Kaj tiam ni bezonus denove ŝanĝi la homon!...

Al la menso de kelkaj alvenis rememoroj de lernejo, aŭ de iom engaĝigaj legaĵoj, kaj oni atentigis, kvazaŭ malkovrante ion jam ekensceniĝantan: „Tio estas la klasika problemo de la ekzisto de la malbono en la mondo: unuflanke ĝia ĉeesto ŝajnas malrajtigi pensi ke ĉe la origino staris (kaj staras) la kreiva ago de iu Dio ĉiopova kaj plej justa kaj plej bona, aliflanke male se oni akceptas tian Dion, ŝajnas necesa la neado de la malbono en la mondo: kio absurdas ĉar kontraŭevidente!"

„Entute, pludiras alia, tio ne estas la problemo malkovrita de Primo Levi (kaj de ni), sed la problemo de ĉiu homo de ĉiu tempo, la problemo kiu okupadis la menson de sennombraj filozofoj kaj ankaŭ, kvankam konfuze, la nian nun".

Ja, Primo Levi plisentis ĝin nur en tragika momento. Kial, do, nur post Auschwitz? Kial ne antaŭ la suferoj de aliaj popoloj? Kia homa barilo emerĝigas la demandon nur kiam la sufero tuŝas la personon de la sufeanto?

La diskuta dialogo kvietiĝis, sed restis ankoraŭ tempo, antaŭ ol ekdormeti, pro fina konsidero: se Dio ekzistas, Li ververe malsamas rilate nin kaj ne eblas dikti por li dekalogon de konduto. Iam la biblia psalmisto sin sentis venkita kaj ĉirkaŭata de ĉiuspecaj malamikoj kaj limiĝoj, sed ne sin sentis embarasita vidi Dion sia liberanto kaj savanto. Eĉ pli: alia biblia profeto enbusigas al Dio: „Ĉar miaj vojoj ne estas kiel viaj vojoj! Kaj miaj pensoj kiel viaj pensoj".

Armando Zecchin



# KRISTANISMO

## LA REMONSTRANTOJ

La Remonstrantoj formas malgrandan, tipe nederlandan eklezion, kiu estiĝis pli malpli devigite el la teologiaj debatoj de la fruaj reformaciaj generacioj ĉirkaŭ la temo de l' antaŭdestino: ĉu Dio jam anticipe (laŭ iuj eĉ antaŭ la kreo de la mondo) destinis kelkajn homojn al la Ĉielo, aliajn al la Infero? La Remonstrantoj protestis kontraŭ tio, i.a. ĉar ni homoj ne povas scii ĉiujn misterojn de Dio. Dum la Sinodo de Dordrecht en 1619 ili estis elpelitaj el la Nederlanda Reformita Eklezio. La eksigitaj pastoroj en la sama jaro, rifuĝinte en Antverpenon, formis la Remonstrantan Frataron. Iom pli poste ili ekfondis etajn komunumojn tra la nordaj Nederlandoj [NDLR: Malaltaj Landoj] — kaj en Friedrichstadt, Germanio.

Depost tiam tiu ĉi eklezio daŭre plu ekzistas, komence iom persekutata, sed baldaŭ tolerata, ĉiam malgranda. Aperis la unua Remonstranta Kredkonfeso en 1621; enhave ĝi estis sufiĉe tradicie protestanta, sed gravegas ĝia enkonduko, kiu konstatas, ke — kiel ĉiu vera kredkonfeso — ĝi nur povas validi por tiuj, kiuj ĝin verkis. Kredkonfeson ja verkas nur la koncernaj homoj mem.

Depost tiam do, la Remonstrantoj pro-principe ne havas kredkonfeson por la tuta eklezio, sed ĉiu persono, kiu sin sentas kapabla por tio, verkas sian propran kredkonfeson, kiun prijuĝas nur sole Dio mem.

De la komenco, la Remonstrantoj emfazis, ke la pastoroj havu fundan universitatan teologian scion. Kaj kiel eklezio ili ĉiam subtenis novajn teologiajn studadojn, ekzemple pri la «fontoj» el kiuj historie formiĝis la Biblio. Ofte tra la jarcentoj, la malgranda tolerema eklezio montriĝis rifuĝejo ankaŭ por teologoj el aliaj landoj, kiuj siahejme estis persekutataj aŭ malhelpataj pro sia laboro. Pluraj Remonstrantoj krom tio, ekzemple kiel magistratanoj, kontribuis al ĝenerale tolerema etoso en Nederlando.

En la 19a jarcento en la teologio estiĝis la t.n. liberala tendenco — modernismo — al kiu la Remonstrantoj kiel eklezio aliĝis. La moto ĉe tio estas: Unueco en kio necesas, libereco en kio ne certas, en ĉio la amo!

En la 20a jarcento profundiĝis la konscio pri komunumeco. Tio i.a. montriĝis en pli da atento por liturgiaj formoj kaj en re-formulado de la Principo-deklaro: «*La Remonstrantoj estas kred-komunumo kiu, radikiĝante en la Evangelio de Jesuo Kristo, kaj fidela al sia principo de libereco kaj toleremo, volas adori kaj servi Dion*». Krome kreskis la sento de socia respondeco de la kred-komunumo. En 1935 kiel unua eklezio en Nederlando ĝi eldonis deklaron kontraŭ la absoluta ŝtato, kiel tiu ekformiĝis en faŝismo, nazismo kaj komunismo.

Jam ekde la komenco (1900), nia eklezio membras en la Internacia Asocio por Religia Libereco (IARF), ligo de liberalaj religiaj organizoj kristanaj kaj ne-kristanaj. Post la Dua Mondmilito (1948), la Remonstrantoj estis inter la fondantaj eklezioj de la ekumene kristana Mondkonsilantaro de Eklezioj.

Sufiĉe specifa por la Remonstrantoj estas, ke — male ol en eble ĉiuj ceteraj eklezioj — ĉe ni la bapto neniel estas li-

## LA GRANDA HOMO KUN MALNOBLA KOMENCO

*Pri tio mem fidante, ke Tiu kiu komencis bonan faron ĉe vi, ĝin perfektigados ĝis la tago de Jesuo Kristo (Filipianoj 1: 6)*

La jaro estis 4 aK aŭ ĉirkaŭ tiam, sed la precizan horon oni ne povus diri. La Di-Bebo svingis Siajn mildajn manetojn dum Sia patrino ridete mallevigis Lin en Sian fojnan lulilon, kvankam la Bebo tiam ne scipovis reciproki rideton.

Ĉie ĉirkaŭ la lulilo blekis kaproj kaj ŝafoj. Oni ne povis diveni ĉu per la blekado la bestoj bonvenigis la nov-naskitan, aŭ tiel protestis bestmaniere, pro ilia manĝajo per kiu oni faris la humilan liteton de la Bebo.

En tiu situacio malaltranga, nenio el Li diferencigis Lin de iu ajn alia homo iam naskiĝinta, krom la stelo kiu milde moviĝis en la ĉielo super la tegmento. Tamen, Li estis Tiu kiu ordonis en la komenco, „Estu...!", tiel ke ja fariĝis (Genezo1).

Sed nun Li kuŝis en manĝujo. Li estis Tiu kies gloro kaj grandiozo kovris la supron de la monto Sinai kiam Li anoncis Siajn ordonojn al la Izraelidoj kaj tiuj tremegis antaŭ Li (Eliro19). Sed nun la gloro estis kovrita dum momento, tiel ke oni nun bezonis lampon por disigi la mallumon surteran kiu svarmis ĉirkaŭ de Li dum Lia humila nasko. Li estis Tiu al kiu multnumbraj anĝeloj senĉese laŭdkantis en la ĉielo.

Sed nun Li devis toleri la blekadon de la kaproj kaj ŝafoj. Li estis Tiu kiu donis akvon en la dezerto al la Izraelidoj vagantaj (Eliro 17: 6; 1 Kor. 10: 4). Sed nun Li bezonis virinon kiu suĉigu Lin. Lia nasko estis ja humila!

La „viro de milito" kies „dekstra mano... estas glora per forto" (Eliro15: 3,6), nun kuŝis humile en liteton kiun homo por Li faris. Kia humileco! Tiu kiu estis en la komenco kovrita per nepriskribebla gloro nun devis akcepti ŝalon. Tio estis humileco!

Tamen Tiu kiu tiel humile venis estas la „Io ĉarma por ĉiuj nacioj" (Ĥagaj 2: 7). Sur tiu Lia milda ŝultro restos la regado... (Jesaja 9: 6). Tiu kiu laŭ la opinio de la mondo meritis nur liteton el fojno ja fortikigos kaj fortigos la tronon de David „per justeco kaj vero". Tiu estis la „markoto el la trunko de Jiŝaj, kaj branĉo...el ĝiaj radikoj" (Jesaja 11: 1). Kia humila nasko!

Sammaniere, vi estante kristano, „el Dio naskiĝis". Ne gravas kiom humila aŭ nekonsiderinda via komenco estas, vi ja „venk(os) la mondon" (1Johano 5:4). Kristo komencis Sian vivon tre humile sed Li eterne restas potencega, mi do preĝas, ke Dio tiel grandigos viajn bordojn en la jaro kiu nun komencas. Amen.

Pastoro Olúbùnmi G. Òshó-Davies

---

▸▸ gita al membreco de la eklezio: por nia kompreno, la bapto ja membrigas en «la Eklezio de Kristo». — Sed se iu deziras membriĝi en konkrete ekzistantan eklezion, tion oni mem — poste — povas fari. Krome, tradicie tra la jarcentoj ĉe ni la partoprenado en la Manĝo de la Sinjoro (= eŭkaristio) estas malferma por «ĉiu persono, kiu tion sincere deziras, ĉu membro de ĉi tiu aŭ alia eklezio, aŭ eĉ tute ne».

En 1986, eble kiel unua eklezio en la mondo, la Remonstrantoj ŝanĝis siajn eklezjajn regulojn tiel, ke ĉiu paro — ĉu gea aŭ geja — sen ajna diskriminacio povas en Diservo peti la Benon de Dio super ilia viv-ligiteco. Ĉar laŭ nia konvinko, ĉiam nur Dio mem povas juĝi pri la homa koro.

Gerrit Berveling
Remonstranta pastoro



# RESPONDOJ

## KONSTERNE

Kara Philippe,

konsternas min artikoleto, kiun mi ĵus legis en nia revuo «Dia Regno» [nr 833, p. 33].

En ĝi certa s-ro Yenovk Lazian starigas du en si mem gravajn kaj interesajn demandojn: «Kiu KELI? Kiu Dia Regno?», — demandojn kiujn pli malpli same ankaŭ mi starigis antaŭ pluraj jaroj dum KELI-kunveno okaze de iu UK. La jaron mi forgesis. Oni ja demandis min, kial mi — ja estante sufiĉe aktiva kristano, pastoro, regula predikanto dum UK-oj kaj aliaj Esperanto-renkontiĝoj, biblia tradukisto, ktp. — kial mi ankoraŭ ne membras en KELI.

Mi tiukaze diris, ke mi iom timas, ke KELI povus esti por tio «tro sekteca, ne sufiĉe malferme kristana», kion la tiea membrokunveno klare neis. Ties sekvo estis ke mi surloke membriĝis. Kaj ĝis hodiaŭ sen bedaŭro miaflanke.

Sed — en la celata artikoleto mi trafas tiel sektecan tonon, ke ĝi eĉ estas timiga.

1) S-ro Yenovk Lazian kontraŭas la fakton, ke (kaj nun mi citas:) «nekristana Esperanto-aktivulo» parolas pri la idealoj de Zamenhof kaj Hodler, konkrete: pri Homaranismo. Mi ne komprenas, kial gravas ĉu la aŭtoro de tiu artikolo estas kristano aŭ ne — ĉe seriozaj artikoloj ja gravas la enhavo! Kaj la temo 'Homaranismo' unuflanke klare ligiĝas al nia komuna lingvo Esperanto, aliflanke ĝia enhavo estas grava — certe por religie interesiĝantaj homoj, — kiujn oni ja atendas kiel publikon ĉe «Dia Regno», ĉu ne? Se eĉ kristanoj kiel kristanoj ne plu okupiĝus pri etiko kaj ties sub-temoj — do, kie ni restus? Kaj la demando «ĉu ni estas homadorantoj aŭ Diadorantoj?» estas nur stultaĵo tiukonekse, ĉar neniel temas pri tio.

2) Ankaŭ «hezitigas» la «troo da ekumenaĵoj»... kio do? ĉu kristanismo retroevoluu al iu stranga, fermita sekteca grupeto, for de la reala vivo, ie en katakomboj, for de la ekstera lumo? (Feliĉe, ke ni ja scias, ke tia kristanismo envere neniam ekzistis. Nur ekzistis foje tra la epokoj tiaj sektoj). Kial eblas kontraŭi, ke kristanoj de la plej diversaj tradicioj ekkonu unu la alian, ekrespektu unu la alian, ekkontaktu unu la alian? ĉar kio estas ekumenismo, se ne la celado eklabori laŭ la idealoj de Jesuo mem, ke ni kristanoj fariĝu gefratoj unuj de l' aliaj? La biblio ja asertas ke kristanojn oni rekonas je ilia reciproka amo! Do kio subtenas tion, tion ni ne kontraŭu!

3) La aŭtoro asertas ke ni kristanoj «apartenas al la sola kaj unu Eklezio de Kristo». Brave. Ĝuste tial nia Remonstranta eklezio ne konas la eblecon membriĝi pere de la bapto: per la bapto ni ja — almenaŭ niakomprene — nur fariĝas «membro de la sola kaj unu Eklezio de Kristo», kaj se certa homo volas fariĝi krom tio membro de certa konkrete surtere ekzistanta organizo, kiun ni homoj nomas eklezio A aŭ B aŭ C ktp, tiam tiu homo mem private tion decidu. Sed por ni Remonstrantoj tio estas du malsamaj aferoj, ne konfuzendaj. Sed ĝuste la fakto, ke «la sola kaj unu Eklezio de Kristo» estas ne konkreta surtere ekzistanta organizo sed transcenda ĉiela afero, kaj ke la efektive surtere ekzistantaj eklezioj teologie kaj hom-etose ege diferencas inter si (kaj nun neniel gravas, ĉu estas eklezioj protestantaj, ĉu ortodoksiaj, ĉu katolikaj, ĉu anglikanaj, ĉu evangelikaj, ktp), — ĝuste tial estas kaj ege instrue / riĉige ekkoni la tradiciojn de l' aliaj eklezioj, kaj samtempe tre utile labori por pli paca inter-kunekzistado inter tiuj eklezioj,

por pli da interkompreno, eventuale finfine eĉ pli da kunlaborado kaj — ho, kiu scias... por eble eĉ unuiĝado organiza... Kaj tio estas la ekumena movado.

4) Poste sekvas certa atako kontraŭ mia Remonstranta eklezio kaj kontraŭ mia pastoreco, kiun mi ne bone povas kompreni. Se tiel nacilingve oni atakus iun ajn eklezion aŭ religion, oni povus perjure procesi, kaj plej verŝajne tuj venkus 'pro malhonora insulto', ĉar temas nur pri tio.

Al la aŭtoro mi ŝatus konsili, iom pli bone ekkoni, kio estas la tasko de la eklezioj: prediki la evangelion, la bonan mesaĝon de Jesuo, liberigan por ĉiuj homoj, ne nur por tiuj kiuj sin jam opinias savitaj... prediki la amon.

Kaj koncerne kion li nomas 'geedziĝojn' de samseksemuloj: tio esta rekta maleblo. Samseksemuloj ja ne volas ke oni trudu ilin en geedziĝojn, kiel dum jarcentoj la grandaj plimultoj de l' publiko en multege da landoj devigis ilin fari: tiaj geedzecoj estis ofte rektaj mensogoj. Kiom suferis ambaŭ partneroj sub tio!

Sed kion foje petas samseksemuloj — ja nepre ne ĉiuj el ili — estas, ke ili rajtu havi stabilan partnerecon, akceptatan socie kaj eklezie. Kaj estas bone, ja inde, ja eĉ miaopinie ekzemplo de bona kristana devo, krei en niaj eklezioj ritojn kaj eblojn por celebri tiajn nuptojn antaŭ Dio. Ĉar se ne estas geedziĝoj, nuptoj ja estas tiaj viv-ligitecoj! Kaj tiaj celebroj antaŭ Dio ne estas 100-procente novaj: dum pluraj jarcentoj okazadis tiaj diservoj pri samseksaj ligitecoj en multaj eklezioj, ortodoksiaj, kaj katolikaj. Pri tio oni nur iom studu la historion. En troigite pruda kaj bigota periodo oni siatempe pli kaj pli marĝenigis la samseksemon, kaj ekfabrikis el ĝi iun krimon, ja eĉ 'pekon' — kaj bedaŭrindege ankoraŭ ekzistas homoj, kiuj — tiel edukitaj kaj ne serioze studinte la te-

▸▸

mon — plu pensas tiamaniere. Sed por ni nunuloj estas fine tempo fariĝi ankaŭ tiuterene iom pli sobraj.

Kristanoj estas ĉiuj, kiuj sincere en sia vivo provas sekvi Jesuon Mesion. Kaj neniu el ni rajtas rifuzi tiun 'titolon' (se titolo ĝi estu) al kiu ajn: ne juĝu por ke vi ne estu juĝita...

Gerrit BERVELING
Remonstranta pastoro

# DIA REGNO KAJ KRISTANISMO

Kara Yenovk LAZIAN, frato on Kristo,

via letero aperis en n-ro 2 (833) marto-aprilo 2002 de *Dia Regno*. Ĉi tiu publikigo signifas por mi, ke ĉiuj legantoj rajtas respondi al viaj diversaj demandoj kaj opinioj. Do, mi volonte faras tion.

Mi estis baptita kiel plenkreskulo. Pro tio mankas al mi la religia eduko en mia infana aĝo kaj multaj el tio kreitaj antaŭjuĝoj. Mi mem elektis mian eklezion laŭ muzika vidpunkto. La luterana paroĥo posedas en nia urbo bonan koruson! Do mi fariĝis membro de la Evangelia-Luterana eklezio — kaj ĝis nun mi ankoraŭ ne pentis pri mia decido. Kontraŭe! Kelkajn jarojn post mia bapto la paroĥestraro demandis min, ĉu mi laboru en la oficejo kiel sekretario de la luterana paroĥo en Westerland. Mi jesis kaj faris ĉi tiun laboron dum 28 jaroj. Al KELI mi aliĝis en 1974 sen iu ajn demando pri la celoj ktp. kaj ankaŭ pri tio mi ĝis nun ne pentis. Kontraŭe — ĉar mi tute ne volas malhavi eĉ unu el la multaj kristanaj kongresoj, kiujn mi vizitis, ĉar tie regis ekumena etoso kun multe da muziko kaj kantado.

*Dia Regno* estas la skriba ligilo inter ni Kristanoj. La enhavo estas dependa de la kontribuoj de ni. Se ni ne verkas, nia redaktoro ne havas materialon. Tiam li devas serĉi aliajn fontojn. Tie ankaŭ rajtas esti artikoloj pri ZAMENHOF kaj aŭ HODLER, ĉar KELI ne ekzistas sen ZAMENHOF kaj lia benata kreaĵo Esperanto. Se en nia gazeto aperas tiaj artikoloj, ni ankoraŭ ne tuj fariĝas «homadorantoj». Sed laŭ mia opinio adoro al Dio ne aŭtomate ekskludas la adoron al famaj homoj, kiel ZAMENHOF aŭ HODLER.

Ekumenismo estas laŭ mia kompreno la kuniĝo de multaj kristanaj eklezioj, diversaj konfesioj. Ĝi tute ne signifas unuiĝo, sed ĉiu eklezio rajtas resti en sia konfesio kaj ĉiu estimu la diversecon en kristana frateco en kunlaboro.

Vian «traktadon» de la samseksamuloj mi tute ne povas sekvi. Laŭ germana leĝo ek de 2002 samseksamuloj povas konfirmiĝi, tio estas registri, sian partnerecon ĉe ŝtataj instancoj, same kiel ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj. Se ĝi nun finfine estas permesata de la ŝtato, kial do la samseksaj paroj ne rajtas esti benataj? Ĉu tiaj homoj ne havas la saman rajton al la beno de Dio kiel vi? Ĉu nur la homoj, kiuj ebligas naski infanojn, rajtas havi la benon de Dio? Kaj kiel estas kun la multaj homoj, kiuj vivas sole aŭ ne havas la korpajn kondiĉojn naski infanojn? Ĉu ili estu kondamnitaj, same kiel vi kondamnas la samseksamulojn? Ĉu ili ne havas saman rajton al la beno de Dio kiel vi? Se vi kondamnas la remonstrantan eklezion en Nederlando, tiam vi ankaŭ kondamnu mian luteranan eklezion, kiu ankaŭ donas la Dian benon al la samseksaj paroj, se ili deziras tion. Laŭ mia opinio estas devo aŭ minimume eklezia afableco, doni al tiaj paroj la benon, se ili ĝin deziras.

Se vi vere volas esti kristana, kiel vi mencias, pripensu vian konduton, forlasu viajn rigidajn pensojn, ne ekskludu homojn, kiuj havas la samajn rajtojn kiel vi. Jesuo Kristo

▸▸

ankaŭ ne ekskludis homojn, male Li diris, «venu ĉiuj, kiuj estas pene ŝarĝitaj, mi volas refreŝigi ilin».

Laŭ ĉi tiu senco mi salutas vin

Astrid HANKE
Germanio

# ĈU «ĜI» MALAPERIS?

«Ĝi», tio estas la Evangelio, la mesaĝo de kaj pri Jesuo Kristo. Pri la vojo kaj la sorto de «ĝi» mi legis amuzan (kaj bedaŭrinde ne nur amuzan) historieton:

Kiam «ĝi» venis al Greklando «ĝi» fariĝis filozofio.

Veninte al Romo «ĝi» fariĝis institucio.

Veninte al Eŭropo «ĝi» fariĝis kulturo.

Veninte al Usono «ĝi» fariĝis komerco.

Ĉu ni devas aldoni: Veninte al KELI «ĝi» malaperis?

Mi devas konfesi, ke mi ofte havas la samajn zorgojn kaj demandojn, kiujn nia frato Yenovk LAZIAN esprimis en la kontribuo *«Kiu KELI? Kiu Dia Regno?»*

Sed certe ni ne rajtas kulpigi nian karan redaktoron pri la manko de la Evangelio en nia *«Dia Regno»*. Mi pensas, ke la legantoj de iu revuo ĉiam estas respondeca pri la enhavo de ĝi.

Konsolo por ĉiuj kristanoj: La mesaĝo pri la Dia Regno *«estos predikita tra la tuta mondo, kiel atesto al ĉiuj nacioj»* (Mateo 24:14), eventuale sen la helpo de *«Dia Regno»*.

Via frato en Kristo

Gerhard HOFMANN

## DESIDERATA

Iru trankvile meze de bruo kaj hasto kaj pripensu, kiom kviete povas esti en silento. Kiel eble plej profunde - sen rezigno pri vi mem - troviĝu en harmonio kun ĉiu. La laŭ vi necesan eldiru kviete kaj klare kaj aŭskultu la aliajn, eĉ se ili estas enuigaj aŭ stultaj, ĉar ankaŭ ili suferas je sia sorto.

Evitu la laŭtulojn kaj kveremulojn, ili konfuzas la menson. Se vi komparas vin kun aliaj, vi povas fariĝi orgojla aŭ amare kolera, ĉar ĉiam ekzistos homoj, kiuj estas pli gravaj kaj pli bonaj ol vi.

Ĝoju pri la atingita kaj pri viaj planoj. Penu pri via propra profesio, kiom ajn simpla ĝi estas laŭ la ĝenerala opinio. Ĝi estas daŭra posedo dum la ŝanĝiĝoj de la tempo. Estu singarda en viaj negocoj, ĉar la mondo estas plena je trompuloj. Sed ne lasu eskapi el viaj okuloj la bonon, ĉar la virto ankaŭ ekzistas. Multaj strebas al idealoj kaj ĉie en la vivo ekzistas herooj. Estu vi mem. Ĉefe ne hipokritu. Ankaŭ ne estu cinika, se temas pri amo, ĉar spite al ĉia dezerteco kaj seniluziiĝo ĝi ne sekiĝas, sed kreskas plu kiel herbo.

Sekvu afable la konsilon de maljunuloj kaj rezignu graciece pri aĵoj de junaĝo. Fortigu la kapablojn de via menso, por per tio protekti vin ĉe subita malfeliĉo. Ne turmentu vin per deliraĵoj. Multaj timoj estas vekataj pere de laceco kaj soleco. Malgraŭ adekvate konvena disciplino, estu afabla al vi mem. Ekzakte kiel arboj kaj steloj vi estas infano de la kreo. Vi estas rajtigata je via ekzisto. Kaj eĉ se vi ne komprenas tion, la mondo certe evoluas laŭ la plano de Dio.

Restu do en paco kun Dio, kion ajn ĝi signifas por vi kaj kiuj ajn estas viaj sopiroj kaj klopodoj en la brua konfuzeco de la vivo. Konservu la pacon ene de via animo. Malgraŭ ĉiuj seniluziiĝoj, penaĵoj kaj elreviĝoj, ĝi tamen estas bela mondo. Estu singarda. Celu vian feliĉon.

Laŭ la angla originalo de 1692 trovita en la preĝejo de Sankta Paŭlo en Baltimoro, Usono.

## DEMANDOJ... ?

La doloro estas grandega;
dum mi meditas pri la dividiteco
kaj la fendoj sur la korpo de mia popolo,
ŝiriĝas histoj miaj.

Mi naskiĝis en malluma nokto
kaj fortostreĉe serĉis la matenon.
Ĉu ĉi vojo kondukas al mateno?
Neniel aŭdiĝas respondo.

Kiom amara estas la gusto,
la gusto de fremdeco kaj ekzileco.
Mi eskapas la rigardon de mia infano,
kiam li demandas pri nia 'hieraŭo'
kaj pri diferenco inter nia
kaj la alia flanko de la muro.

Mia patrino eskapis min,
kiam mi demandis pri la 'morgaŭa' tago.
Neniu scias kiam leviĝos la suno.
Mi naskiĝis en malluma nokto
kaj en la lando kie staris mia lulilo
... ankoraŭ ĉiam daŭras la nokto.

Forugh Bahram Karimi
rifuĝis el Afganio

Ŝian poemon tradikis
Jacques TUINDER.





## FABRIZIO PENNACCHIETTI KURSOS PRI ISLAMO ĈE KCE

Post la sukcesa Januara Monatfino, Kultura Centro Esperantista invitis profesoron Fabrizio PENNACCHIETTI, de la Torina Universitato, gvidi tutan kurson pri „Islamo: kiel kompreni ĝin nuntempe?" en Ĉaŭdefono. Li afable akceptis la inviton, kaj ni ĝojas informi ke la kurso okazos de mardo la 23an ĝis dimanĉo la 28an de julio 2002.

En aŭgusto 2002 disvolviĝos la delonge anoncita Plurnivela Internacia Kursaro. Tri kursoj, pri unua, dua kaj tria gradoj, paralelos en la semajno 6–11 aŭgusto, kaj tri aliaj en la semajno 13–18 aŭgusto. Al komencantoj instruos hungara instruistino, partopreninta en Projekto KLERA de LF-koop. Al progresantoj instruos s-ino Perla MARTINELLI (surbaze de la lasta eldono de „Paŝoj al plena posedo" de William AULD). En la unua semajno, d-ro Giorgio SILFER gvidos kurson pri la Esperanto-literaturo, kun monografia parto specife dediĉita al la jaroj 1903–1917 (de la Fundamenta Krestomatio ĝis la morto de „La Ondo de Esperanto"). En la dua semajno, Tomasz CHMIELIK gvidos kurson pri historio de la Esperanto-komunumo, specife dediĉita al la kunlaboro inter Hector HODLER kaj Edmond PRIVAT, kiuj eklernis Esperanton ĝuste en somero 1902.

Krom la kursoj, la restado en Ĉaŭdefono inkluzivas ĉiutage distrajn programerojn. Agrablaj dormoĉambroj, bongustaj manĝoj, moderaj tarifoj.

Informas: KCE, cp 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Tel/fakso (41)32 9267407, rete <kce.esperanto-@bluewin.ch>
HeKo n-ro 156

### Ĵus aperis la 3-a (aprila) numero de la revueto 'Humanitas'

Ĵus aperis la 3-a (aprila) numero de la revueto 'Humanitas' <http://www.geocities.com/adhumanitatem/human3.htm>. Ĝia iom pli frua apero estas kaŭzita de preparoj por la komencaprila Fondkunveno de la Ligo 'Humanitas' <http://www.geocities.com/adhumanitatem/1kunveno.htm>.

La revueto estas legebla laŭ la TTT-adreso <http://www.geocities.com/adhumanitatem/human.htm> kaj abonebla (rete senpage) laŭ la retadreso <mato.spekuljak@zg.tel.hr>.

Mato ŜPEKULJAK
nome de la Ligo 'Humanitas'
www.geocities.com/adhumanitatem

### Nova libro el (P)ruslando

„Sezonoj" en la jaro de la 225a naskiĝdatreveno de Ernst Theodor Amadeus HOFFMANN eldonis lian novelon „Konsilisto Krespel" (Rath Krespel en la germana). Ĝi estas unu el la eroj de la populara novelaro de HOFFMANN „Serapiona frataro". La novelon tradukis el la germana lingvo Wolfgang Kirschstein.

▸▸

## AMO

Am' bonvenigis; la anim' retiris,
Polva, pek-makulata.
Vidante min, post kiam mi eniris,
Heziti, Amo gvata
Pliproksimiĝis, dolĉe demandanta
Ĉu io estas mankanta.

Respondis mi, „Gast', digna ĉeestulo".
Am': „Mi gastigos vin".
„Mi, kruda kaj sendanka? Mi, karulo,
Ne povas rigardi cin".
Manpremis Am', kaj faris dolĉan ridon:
„Ĉu vi donis la vidon?"

„Prave; sed mi difektis; honto mia
Foriru kiel kulpanto".
Am' diras, „Kiun ŝarĝis kulpo via?"
„Mi estu la servanto".
„Sidiĝu, ĉar la manĝon mi aranĝis".
Do sidis mi kaj manĝis.

George HERBERT (1593-1633)
Esperantigis Michael CAYLEY

---

▸▸

Estas interese, ke la Esperanta traduko de la novelo, priskribanta la vivhistorion de la mania muzikisto kaj ties filino, estas eldonita en la naskiĝurbo de HOFFMANN: Konigsbergo/Kaliningrado. „Konsilisto Krespel" estas la unua libro, kiun „Sezonoj" eldonis post la transloĝiĝo el Uralo al Baltio. La 24-paĝa libreto estas mendebla ĉe la eldonejo poŝte (RU-236039 Kaliningrad, p.k. 1248, Ruslando) aŭ rete: <sezonoj@yahoo.com> kontraŭ nur 2 euroj.

„Heroldo komunikas"

## KELI

Plej karaj KELI-gefratoj,

Vidante teruran amasiĝon de paperoj, kiujn ade elsputas la neniam laca ĉe-poŝta maŝinaro de Vera, mi klopodas respondi al vi, uzante la dimanĉan ripozon... Mi petas pardonon, sed tro da taskoj kuŝas sur miaj ŝultroj.

Nelaste mi utiligas la okazon anonci, ke kun teamo mi estos en Srilanko de la 8-a ĝis la 24-a de majo, vizitonte tri projektojn. Kulmino estos la oficiala malfermo de nova lernejo kaj tranoktejo por blindaj Tamil-infanoj en Batticaloa, kiun projekton subtenis la nederlanda registaro, la forte kunfinancanta organizaĵo *Sovaĝaj Anseroj*, la Bonfara Revendejo en mia loĝloko, mia komunumo kaj nelaste la abatejo, en kiu mi volontulas. Sed ankaŭ plenmano da homoj parolantaj lingvon de espero kaj esperantistoj.

Siegfried pravas, ke *Zienderogen* 'evidente' havu sian elektronikan paĝon.

Jam notu, ke la du lastajn semajnojn de septembro mi — *Deo volente* — estos en Moldavio kune kun du optikistoj el mia regiono por viziti kaj okulvitre helpi centojn da tiel nomataj 'forgesitaj infanoj de Orienta Europo'. Nune miaj bonaj, riĉaj kaj sindediĉaj partneroj en mia lando estas stariganta brajlopresejon en la ĉefurba blindulejo, por ke vidhandipitaj lernantoj baldaŭ havu siajn lernolibrojn en malplatskribo! Kvar blindaj esperantistoj en Moldavio, la plej malriĉa lando de Europo, sopirus partopreni la internacian kongreson por vidhandikapitaj esperantistoj en Hungario. Por unu ni jam trovis sponsoron. Vojaĝkostoj kaj IKBE-kotizo ne superas ĉirkaŭ 220 USD.

Jes, bedaŭrinde ni perdis multmeritan kaj simpatian membron en la nepre enĉieliĝinta persono de David. Vera kaj mi sendis skriban kondolencon al Nora. Dank'al la ĉielo aliaj valoraj surteranoj transprenis la zorgon pri la eldonado de la Sankta Skribo en la bona lingvo.

Mi ĝojas, ke kelke da svedaj KELIanoj intencas ĉeesti nian ĉijaran kongreson, por ke ni povu diskuti problemojn kaj estontecon de la eksa tiulanda sekcio. Mi miras, ke vivas ankoraŭ 40-45 membroj en Svedio! Aparte ĝojige estas la veno de Anna kaj Mats. Ankaŭ, kompreneble, Esperanto-Misio postulos nian atenton! Mi mem proponus, ke ni prenu parton de la kapitalo por negrandskala disvastigo de ADORU inter kelke da malriĉaj sed aktivaj kristanoj-esperantistoj. Kion vi opinias?

Al la LKK mi denove emfaze diru, ke la kongresa temo — **LIMOJ** — vere tre aktualas kaj sekve al mi plaĉas. Al Éva kaj Zoltan mi dankas pro la 10/3 ricevitaj bibliaj lokoj inspiraj kaj konsultindaj.

Vera kaj mi, kiom ni nune povas superrigardi, ŝatus iri al komuna kongreso en Rimini venontjare. Ni neniam estis en Italio, kaj nelaste: la kondiĉoj promesas esti tre favoraj. Malavantaĝo estas ke pluraj pro la malfavora periodo ne sukcesos ĉeesti.

Plura kialo por ĝojo estas la fakto, ke la ĉijara kultura premio de la Urbo Aalen estis aljuĝita — tute prave — al la aŭtoroj de **Adoru**. Gratulon al la (ad )ora triopo!

Eble vi scias, ke oni petis min membri en la estraro de fondaĵo celanta konstrui elementan lernejon en Togolando. Vendredon mi ĉeestis kunvenon en Amsterdamo, kie nia modesta kaj por Afriko aktiva samideano Hans BAKKER el la manoj de la urbestro ricevis reĝinan distingiĝon (kavalirecon). Varman gratulon, Hans! La urbestro komencis menciante la grandajn meritojn de Hans BAKKER-patro, kaj por Esperanto (instruado kaj propagando) kaj por la juda enloĝantaro de nia ĉefurbo, fervorante pri maljunulejo.

Por hodiaŭ sufiĉas. Mi sentas min prezidanto privilegiita ĉar Els tre sperte kaj lerte faras amason da laboro. Sen ŝi mi vere estus tre forte handikapita! Ĉu ni havas kapablajn skulptistojn en nia rondo? Li aŭ ŝi, kiu tutcerte ekhavos statuofaran laboron por plur-pluraj geaktivuloj inter ni, tuj anoncu sin!

Ke la ĉielo abunde benu vin kaj la viajn. Pacon al vi.

Vera kaj Jacques TUINDER

## KIEL SENPERFORTE VENKI MALJUSTECON?

Ni, kiel homoj, havu kuraĝon, solvi niajn problemojn pere de dialogo kaj intertraktoj. Parolante ni nenion perdas, dum tro multon ni perdas sekve de perforto kaj milito.

En la nuna "Internacia Jardeko por Kulturo de Paco kaj Senperforto por la Infanoj de la Mondo" (2001-2010) ni ĉiuj, kiel fratinoj kaj fratoj, staras antaŭ la defio trovi novajn manierojn por forigi la profundajn radikojn de perforto, kaj el niaj propraj koroj kaj el la mondo.

Mairead CORRIGAN MAGUIRE
(Nobelpremio por la paco, 1976)
tradukis: Jacques TUINDER

## „ADORU" MONTRIĜIS BONEGE SERVI ANKAŬ EN INTERRELIGIA RENKONTIĜO!

Laŭ longa tradicio la vidhandikapitaj esperantistoj en mia lando ĉiujare kolektiĝas dum semajnfino por renkontiĝi kaj okazigi sian jarkunvenon. Bedaŭrinde la nombro, ankaŭ en tiu griziĝanta rondo, ade malkreskas. En aprilo pasinta 22 membroj de la Nederlanda Societo por Blindaj Esperantistoj (NoSoBe) direktiĝis al hotelo en Nunspeet. Al la esperantistoj jam dum multaj jaroj apartenas Vera kaj mi. Ofte ĉeestas ankaŭ nia membro Wim KOOPMANS, dum lia edzino, kiam ŝi ankoraŭ vivis, ĉiam varme kaj profesie gvidis la dimanĉan Diservon. Post ŝia morto oni petis al mi transpreni tiun liturgian taskon.

Ĉar mi rimarkis, ke ĉeestas ĉefe kristanoj kaj forrestas nekristanoj, mi eksperimente — kaj sukcese! — klopodis inviti ĉiujn al la dimanĉmatena kunveno. Mi venis al la ideo prezenti ĉifoje nian kant- kaj preĝ-libron *Adoru* kaj decidis preni ĝuste tekstojn el la suplemento, *'eta flor-bukedo el aliaj religioj'* (926). Mi komencis per psalmo 8 kaj fermis, preĝante la Preĝon de Baha u'llah.

Antaŭe mi zorge brajlis ĉiujn tekstojn kaj disdonis jam sabate al la partoprenantoj, petante laŭtlegi kaj eventuale komenti kaj priparoligi la legitan citaĵon. Nu, mi povas diri, ke por ĉiuj estis vera travivaĵo, kiom profundaj estas la primeditataj tekstoj! Kaj kiom proksimaj al ni estas pensoj antaŭ- kaj ekster-kristanismaj. Unu el la ĉeestantoj per kelkaj vortoj trafe eksplikis malpli konatajn tradiciojn (ĝainismo, zoroastrismo, sikismo, ktp.).

Bonege estis, ke iu partoprenis ludante gitaron. Ŝi kunprenis proprajn kantojn, el kiuj ni almenaŭ du povis kune kanti Tuj post la malfermo ni kantis «Kiom da mono elspezas la mond' por bomboj, raketoj kaj mort'? — Kiom da vojoj en tuta la mond' abundas per larmoj, sufer'? — Kiom da homoj en malliberec' sopiras ŝanĝiĝon de l' stat'?» Kaj rekantaĵe ni konfesis, ke «respondas tutsole nur la vent'».

Mi mem spertis, kiel d-ro Zamenhof, hilelisto kaj homarano, siatempe pensis pri kunvenoj en konstruaĵoj (temploj), kie homoj diverskonvinkaj renkontiĝus kaj legus el la verkoj de la grandaj instruistoj de la homaro...

Dum la 'liturgio' mi petis al la NoSoBe-anoj per monkolekto ebligi al almenaŭ unu aktiva esperantistino en Moldavio ĉeesti la ĉijaran kongreson de blindaj esperantistoj en Hungario. Ho, pluraj aliaj el tiu lando ekonomie plej malriĉa tion sopirus, sed mankas al ili eĉ la mono por simple vivi kaj supervivi.

Ni fermis la varman kaj instruan kunestadon eksperiment-karakteran per *'Hevenu ŝalom aleĥem, hevenu ŝalom aleĥem.'* — Kaj paco estu kun ni, ktp.

Jacques TUINDER



# Pentekosta Diservo en Friedrichstadt

Pli ol 120 partoprenantoj ĉeestis la 79-an Germanan Esperanto-Kongreson dum Pentekosto (17-a de majo ĝis 20-a de majo 2002) en Husum. Ne ĉiuj programpunktoj okazis en Husum. Unu el ili — por mi la plej grava — estis en Friedrichstadt sude de Husum. Ĉi tiu ekskurso kun ekumena Diservo venkis kiel plej ŝatata de la partoprenantoj.

Kvankam mi jam konas Friedrichstadt, ĉi tiu urbo ĉiam denove allogas min, kaj mi estis tute surprizita, kiom la organizantoj, Christian kaj Sabine DARBELLAY, elektis por la kongresanoj en Friedrichstadt.

Ni veturis per aŭtobuso de Husum al Friedrichstadt, faris malgrandan rondiradon tra la urbeto sub gvidado de Sabine DARBELLAY ĝis la ponto, kie ekveturas boatoj sur la riveroj Eider, Treene kaj tra la kanaloj. Ĝoja surprizo por mi, ke okazis por ni ŝipveturado tra la diversaj kanaloj *(Grachten)* de Friedrichstadt. Ĉar Friedrichstadt estas nia nordgermana urbo, kie vivis kaj laboris multaj Nederlandanoj, kiuj estis en malnova tempo persekutitaj pro ilia kredo, ĉi tiu urbo estis konstruita kiel nederlanda urbo rilate al la kanaloj kaj al la diversaj domoj, kiuj konservis ĝis hodiaŭ ĝian tipan nederlandan stilon. Ankaŭ Friedrichstadt estas konata kiel urbo de la multfacetaj diversaj eklezioj, kiuj vivas tolereme kune.

Post unuhora boatekskurso kaj paŭzo en la mezo de la urbo ni kolektiĝis en la preĝejo de la remonstranta paroĥo. Antaŭ ol komenciĝis la ekumena Diservo, pastro Albrecht KRONENBERGER (kat.) kantis kun ni la diversajn melodiojn el la liturgio por la pentekosta sabato.

Komence pastorino LAMAN-TRIP de la remonstranta eklezio bonvenigis nin kiel gastiganta paroĥo kaj prezentis al ni mallonge la remonstrantan paroĥon. Unufoje monate ŝi venas el Nederlando por celebri Diservon en Friedrichstadt en nederlanda kaj germana lingvoj. Krome ĉeestis dum nia ekumena Esperanto-germana Diservo la luterana pastoro Michael JORDAN, «nia» remonstranta pastoro Gerrit BERVELING, kiu predikis en Esperanto, tradukita de pastro Albrecht KRONENBERGER, Hermann LOERCHNER, laiko de la menonitoj, kaj s-ro Peter ROENPAGE, kiu reprezentis la judan komunumon. Ĉiuj kuncelebrantoj prezentis koncize sian paroĥon kaj preĝis kune la porpetojn.

Kiel speciala surprizo partoprenis ankaŭ koruso el Friedrichstadt, kiu prezentis dum la Diservo la *«Ave verum»* de MOZART kaj la himnon de BEETHOVEN *«La ĉielaro l'Eternan honoras»* dank al la fakto, ke Henning HAUGE estas membro en ĉi tiu koruso. Dum ĉi tiu tre harmonia ekumena Diservo ni povis konatiĝi multajn germanojn, kiuj ĝis nun ne praktike aŭdis Esperanton, kun la internacia lingvo. Ĉe la fino pastro Albrecht KRONENHERGER transdonis al la remonstranta pastorino kiel danko pro la gastamikeco ekzempleron de la nova ekumena kantlibro *Adoru*.

Post la Diservo mi esprimis mian ĝojan miron pri la multfaceta ekume-

## GERMANA EKUMENA DISERVO

En Husum (Ŝlesvig-Holstinio) okazis la 79a Germana E-Kongreso de vendredo la 17a ĝis inkl. lundon la 20an de majo 2002
En ties kadro okazis en Friedichstadt, en la tiea Remonstranta preĝejo, ekumena diservo, kiun gvidis pastro Albrecht KRONENBERGER (RK) kaj pastoro Gerrit BERVELING (Rem.), kun kunlaboro de lokaj reprezentantoj de Judoj, Luteranoj, Menonitoj kaj Remonstrantoj. Kantis krome el BEETHOVEN kaj MOZART loka ĥoruso.

La predikon faris pastoro BERVELING; iom mallongigante tradukis pastro KRONENBERGER.

La tuta diservo estis dulingva, ankaŭ por surloke loĝantaj homoj.

Post la diservo pastro KRONENBERGER donacis ekzempleron de *ADORU* al la Remonstranta pastorino Laman TRIP-KLEINSTARING.

Gerrit BERVELING

---

▸▸

na kaj eĉ interreligia partopreno en ĉi tiu Diservo kaj ricevis la surprizan respondon: «*Tio estas tute kutima ĉe ni en Friedrichstadt*».

Ĉi tiu eksterordinara amika Diservo en Friedrichstadt restos en bona memoro de verŝajne ĉiuj partoprenantoj dank' al la bonega kaj zorgema preparo de Christian kaj Sabine DARBELLAY kaj Henning HAUGE.

Astrid HANKE

## PENTEKOSTO SABATON 18-AN DE MAJO 2002 FRIEDRICHSTADT

**Prediko**
Ps 19
Eliro 19:1-6
Agoj de Apostoloj 2:1-17

Antaŭ multaj jaroj dum Pentekosta semajnfino okazis eŭropa Esperanto-kongreso en Luksemburgo. Tio estis por mi la unua internacia Esperanto-kunveno, kaj same kiel sian unuan amon oni kutime ne forgesas, ankaŭ tion mi ne forgesis. Dum tiu semajnfino okazis ankaŭ Diservo. La predikisto komparis la Esperanto-movadon kun la Pentekosta historio, kiun ĵus vi aŭskultis el la priskribo de Luko. Laŭ li, la multlingveco en la mondo (vidu la rakonton en *Genezo* pri Babel kaj ties turo) estas puno de Dio pro la malobeo de la homoj. Kaj Esperanto — liadire — estis kvazaŭ unua ĝermo en nia realo pri nova kaj espero-plena estonteco, en kiu la homaro vivos konkorde, kaj laŭ la ordonoj de Dio.

Bela prediko. Certe. Sed...

Sed ne tro rapide, nek tro simplanime oni faru tian identigon! Ĉar ĉe Luko ne primare temas pri lingvoj, pri lingvokonfuziĝo kaj ties malapero mirakla.

Se vi atente legas la tekston de *Agoj de Apostoloj*, kaj se vi ankoraŭ neniam ĝin faris, mi nepre konsilas al vi ĝin fari — estas nur kelkdek paĝoj — tiam vi konstatos, kion Luko efektive provas transdoni al ni: li parolas pri la formiĝo de la movado ĉirkaŭ la resurektinta Mesio, ĉirkaŭ Jesuo kiu releviĝis el la mortintoj (se uzi la klasikajn esprimojn): en lia rakonto ni trovas plurajn klarajn scenojn pri la formiĝo de **la** Eklezio.

Kaj pri kio tiam temas? Kio karakterizas tiun Eklezion? — Eble iom bedaŭre por ni nunuloj, ĉu tradicie ni estas kristanoj aŭ eĉ ne-religiemaj homoj: bedaŭre por ni, ĉe Luko ni renkontas nur tre malmulte el tio, kio por ni kutime karakterizas la Eklezion: ne renkontiĝas ĉe li papoj, patriarkoj aŭ episkopoj — almenaŭ ne en la nuna formo — ja renkontiĝas ĉe li plurloke diakonoj kaj profetoj, ĉu viraj ĉu inaj — sed tiuj diakonoj (informas nin la historiistoj) ne multe similis la nunajn diakonojn nek en la tradicio de Romo, nek en la reformacia tradicio. Kaj kion niaeklezie ni faris el la profetoj? Nu, tiujn ni nomas pastroj / pastoroj...

Sed ne tiuj estas la ĉefa temo de lia libro. Kion ni multe pli centre renkontas ĉe Luko, en *Agoj de Apostoloj*, estas: homoj, kiuj nove orientiĝis en la vivo pro ilia renkontiĝo kun Jesuo Mesio. Ni trafas malgrandajn komunumojn en plej diversaj urboj, kiuj — kaj nun mi citu — *Agoj 2:42: persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigado de pano kaj en preĝoj.*

Kion ni renkontas ĉe Luko, estas Eklezio kiun plu instigas / plu stimulas / plu inspiras tiu mistera forto de Dio — la Spirito. Jam junaĝe mi aŭdis — kaj ĝi ĉiam ankoraŭ ŝajnas al mi tre senchava konstato — ke ĉe Luko ĉefe temas pri la Spirito, la Spirito de Dio, la Spirito homojn inspiranta.

Kaj ĝuste tial do, ili faris kion mi ĵus citis. Ĝuste tial tiu unua komunumo de Jerusalem estas pentrita tiel idealece. Ĉion ili havis komune inter si; ili estis veraj kunuloj en la plena senco de la esprimo: ili kune rompis la panon (= manĝis kune; multaj diras: kune celebris la eŭkaristion / la Sinjormanĝon), ili preĝis kune.

Ni *post-modernismuloj* tuj demandas nin, ĉu do vere estis tiel ideala komunumo? Ĉu tio home eblas?

— Feliĉe jam la sekvaj scenoj ĉe Luko mem montras, ke eĉ tie / tiam la homoj estis nuraj homoj, ne idealigeblaj estuloj: ankaŭ en tiu komunumo de Jerusalem montriĝas esti trompistoj, kiuj eble deziras pli profiti ol kontribui...

Tamen, retas la fakto, ke la mesaĝo de Luko ne unuavice temas pri lingvopolitiko, pri internacia lingvo k.s. — tio estis temo ekster lia horizonto. Luko serĉis (kaj predikis) komunumon nome de Jesuo Mesio, kiu vivu laŭ maniero ideala antaŭ Dio.

Do, nian Esperanto-movadon ni ne tro simplanime identigu je tio. Sed *iel mi jam kaŝe ĝin kun-diris: ankaŭ niajn kristanajn ekleziojn* ***kiun ajn*** *(en la ideo-historio de nia homaro ja ne decidige gravas la nombro de la aprobantoj)* ankaŭ niajn kristanajn ekleziojn ni ne tro facile identigu je tiu *revo* de Luko.

Kion nun mi diras? Revo de Luko - kio? Ĉu Luko do ne estas nia plej unua historiisto de kristanismo? Ĉu *Agoj de Apostoloj* ne estu historie fidinda?

— Tio dependas de la respondo, kiun oni donus al la demando, kio estas historie fidinda. En la Grek–Romia helenisma periodo en kiu vivis kaj verkis Luko **kaj nepre ne nur li**, la idealo de la historiografio ja ne estis identa je tio, kion nuntempe ni nomas *historia objektiveco*. El mia dua fako **pri klasika filologio Latina kaj Greka** mi ja scias, ke la grandega

idealo tiuepoke estis: portreti la historie gravajn personojn kaj okazaĵojn tiel, ke la leganto tuj sentu / travivu / spertu kion tiuj personoj kaj eventoj plej profunde **signifis**. Moderna Nederlanda teologo antaŭ nelonge — iom troige, sed eĉ nur iom — nomis *Agoj de Apostoloj grandioza historia romano*. Luko pentras kvazaŭ idealojn, bildojn, epizodojn, kiuj dum la cetero de la vivo restos en via kapo, tiel lerte tion li faras. Kiu ja forgesas la belegan vizian bildon pri la dekdu apostoloj kune kun Maria kaj manpleno da aliaj, tute timo-plenaj, sin enŝlosinte en sia salono B ĝis, jen, venas la fortega ekblovo de l' Spirito de Dio, la fajraj flamoj, la sono de la ventego, la erupcianta inspiriteco...!!! Kiu forgesos tiun bildon? Tamen — estas bildo.

Bildo, kiu montras, pri kio **fundamente** temas: ni homoj, eĉ se ni **diras** ke inspiras nin Jesuo Mesio **kaj tion kristanoj ofte asertas**, ni restas ĝenerale nur en nia propra eta rondo, ni nur kvazaŭ enfermas nin, defendante niajn ekleziajn kunvenojn kontraŭ la danĝeraj influoj de ekstere... sed kion efektive Dio ordonas al ni? Ke ni foje leviĝu, ke ni ekstaru, ke ni ekagu ankaŭ eksteren. Ni ne estis vokitaj por esti la torto, kiun manĝu la mondo. Ni ne estas vokitaj por fariĝi la plej bona parto de la homaro, sed ni ja estis vokitaj (diras Jesuo) por *esti la salo* en la torto, por doni lumon por la homoj, por ke ili vidu kien eblas paŝi.

Do, kion efektive ni festas je Pentekosto?

La naskiĝdaton de la Eklezio. Jen iom tradicia sed bona respondo.

Sed origine Pentekosto ne estas festo kristanisma: Judismo jam delonge festadis tiun daton, sep semajnojn post Pasko: post la ekiro el la *lando de prema teco* (jen, kion signifas la Biblia Egiptujo: *micraim*), do post Pasko, sep semajnojn poste ni alvenas ĉe Sinaj, por tie aŭskulti la Ordonojn de Dio JHVH: se **tiujn** ***dek parolojn*** ni homoj scios plenumi, nia mondo vivos multege pli pace ol ĝis nun...

Do, je Pentekosto unuavice **tion** ni festu: ni homoj, ni ja ricevis la vojmontrilojn al la Vera senchava Vivado. Kaj samtempe, paralele, sed kun kristanisma kun-sono, ni festas la datrevenon de la movado ĉirkaŭ Jesuo Mesio, la Eklezio. Kaj kiel esperantistoj ni rajtas plenfiere samtempe festi, ke la teruran miskomprenadon inter la homoj kaj popoloj **minimume** ***principe*****, minimume** ***por komenci*** ni venkis per nia Internacia Lingvo, kiu montras ke homoj de bona volo ja kapablas interkompreniĝi — idee kaj lingve.

# KELI

## PROTOKOLO PRI LA JARKUNVENO DE KELI, 2001-07-19, DUM LA EKUMENA KONGRESO EN ZAGREBO

1. Nia prezidanto Jacques TUINDER bonvenigis nin kaj malfermis la jarkunvenon 2001.

2. Britta REHM anstataŭis Els VAN DIJK kaj protokolis.

3. Funebra memorigo.

Sekvontajn geamikojn ni danke honoris per silenta momento:

Nederlando: Dr. FAFIÉ; Britio: Hugh MARTIN; Svedio: Harald ANDERSSON, Birger VIGGEN, Amy NILSSON; Finnlando: Marjatta LINJAMA, Eeva SAARINEN; Usono: Armin DONEIS; Germanio: Ursula RICHTER.

4. Sekretaria jarraporto.

Ĝin ni iom komentis kaj la prezidanto esprimis nian dankon al la sekretario. La jarkunvenan leteron de Els VAN DIJK kaj la edzo ni danke akceptis.

5. Kasista jarraporto.

La kasisto Siegfried KRÜGER sufiĉe detale komentis la raporton, i.a. pri diversaj helpaj kasoj. La prezidanto dankis ankaŭ la kasiston pro la zorgema laboro pri la kaso.

6. Raporto de la kaskontrolantoj (Karl Heinz SCHAEFFER kaj Willi SCHÄFER).

Ili trovis ĉion en ordo kaj rekomendis al la jarkunveno malŝarĝon de la kasisto por la jaro 2000.

La kunveno decidis laŭ la rekomendo.

7. Altigo de la kotizo.

La kasisto pledis por altigo de la kotizo de 15 al 20 Eŭroj en 2002. Estos risko ke la kapitalo malgrandiĝos kaj rilate al tio ankaŭ malgrandiĝos la rentumoj kompreneble. La kunveno aprobis la altigon. Membroj de la ekssocialismaj landoj rajtas pagi laŭ iliaj fortoj.

8. Elekto de kaskontrolantoj por la kaso 2001.

Horst HUB (nova) kaj Karl Heinz SCHAEFFER.

9. Buĝetoj.

La kunveno priparolis la buĝetojn kaj aprobis la proponon por 2002.

10. Jarraporto de la redaktoro de *Dia Regno*.

Philippe COUSSON faris ĝin buŝe kun komentoj. I.a. li volus havi pli grandan kunlaboron de ni kaj volonte scias dezirojn pri la enhavo en la gazeto. Ni dankas lin pro grava, bona laboro.

11. Esperanto-Misio.

Esperanto-Misio en Litovio post transporto de materialoj el Pollando ankoraŭ ne efektive funkcias laŭ rimarko en la bilanco. Ni devas atingi pli da informo.

12. Estrarelekto.

Ĉi jare finiĝas la deĵorperiodo de Els VAN DIJK, Britta REHM kaj Ma YOUNG-TAE. El ili Ma YOUNG-TAE ne estis reelektebla. Feliĉe la juna hungaro SOMHEGYI Zoltan deklaris sin preta eniri en la estraron. La kunveno reelektis Els VAN DIJK kaj Britta REHM kaj novelektis SOMHEGYI Zoltan.

13. Ekumena komisiono.

Adolf BURKHARDT ne plu volas esti prezidanto de la komisiono sed povas resti en ĝi kiel membro.

La jarkunveno reelektis FARKAS Éva, Adolf BURKHARDT, Jacques TUINDER kaj Marie-Louise MÜNGER por la komisiono.

14. Kongresaj planoj.

En 2002 okazos la Universala Kongreso en Brazilio kaj en 2003 en Göteborg (Svedio). La hungaroj proponis organizi Kristanan Kongreson en 2002 en Berekfürdö proksime de Debrecen.

FARKAS Éva parolis iom pri la kongresloko. Ni dankeme akceptis la proponon. Pri 2003 la jarkunveno ne havis eblecon decidi. Ekzistis inviton de la sveda KELI-sekcio sed tiu ne estas realigebla ĉar la sekcio ne plu ekzistas post la sveda jarkunveno en majo. Krome ne estas multe da helpantoj nuntempe. Bengt Olof ÅRADSSON, sveda estrarano de KELI, skribis leteron al la jarkunveno kaj esprimis iom da optimismo. Kvankam al ekumena kongreso en Svedio la katolikoj verŝajne ne venus. IKUE invitis nin al ekumena kongreso en Rimini. La hungaroj estis pretaj denove aranĝi kongreson en sia lando sufiĉe apude de Budapest.

Ni lasis la aferon provizore.

15. Fermo de la jarkunveno.

protokolis Britta REHM
kontrolis Wil VAN GANSWIJK
kaj FARKAS Éva.

## TAGORDO DE LA JARKUNVENO DE KELI, 2002

1. Malfermo
2. Elekto de kunprotokolantoj
3. Funebra memorigo
4. Sekretaria jarraporto
5. Kasista jarraporto
6. Raporto de la kaskontrolantoj
7. Buĝetoj
8. Jarraporto de la redaktoro de *Dia Regno*
9. Esperanto-Misio
10. Estrar-elekto. Ĉijare finiĝas la deĵorperiodo de la kasisto Siegfried KRÜGER kaj de la estrarano Pavel POLNICKÝ. Ili ambaŭ estas reelekteblaj.
11. Kongresaj planoj. Estas la vico de Ekumena Kongreso (kongreso aranĝita de IKUE kaj KELI). Ni proponas akcepti la inviton de IKUE organizi la Ekumenan Kongreson en Rimini, Italio. La cirkonstancoj estos tie favoraj. Ni konscias ke la dato de la kongreso, 30.8.03 ĝis sabato 6.9.03 povus estis problemo por tiuj personoj kiuj ne povos liberigi sin de la laboro en tiu periodo.
12. Ideoj kaj sugestoj de la membroj
13. Fermo

## ESPERANTA DISERVO LONDONA SUR LA RETO

Karaj gefratoj!

Ĉi kune mi informas, ke la Esperanta Diservo Londona nun havas sian hejmpaĝon sur la TTT:

http://uk.geocities.com/keb560319/edlhejm.htm

Kevin BOURNE
kevin.bourne@classicfm.net

NEKROLOGO PLIA

## DAVID FEATHERSTONE

David FEATHERSTONE naskiĝis en 1923 en Croydon, la sama loko kie li loĝis ĉe sia morto. Je la aĝo de 13, li gajnis reĝan stipendion por Westminster School. De tie li iris al Oxford, New College, por studi la latinan, la grekan kaj teologion. Tion interrompis kvar-jara soldata servo en la Reĝa Aer-Armeo. En Oxford, li remis por la teamo Isis. Li estis ankaŭ aktiva membro de OICCU, la inter-kolegia kristana unuiĝo, kie li renkontis sian estontan edzinon.

Post la soldata servo li iris al Irano kaj laboris tie por la Anglo Iranian Oil Company en 1947. Li kaj Nora geedziĝis en 1950 post reveno al Anglio, kaj poste ili reiris al Irano, kie Nora laboris kiel sekretariino de la episkopo. Post la naciigo de la petrol-kampoj, ili transloĝiĝis kun la filo Michael, naskiĝinta en Irano, al Calcutta, kie David dum kvin jaroj estris la oficejon de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo. Paul kaj John naskiĝis dum tiuj jaroj en Hindio, kaj la plej juna filo Simon post la reveno al Anglio, en 1958.

Reveninte al sia lando, David kvalifikiĝis kiel instruisto kaj poste deĵoris kiel lernejestro, docento en Instruista Kolegio, kaj fine kiel ĉefo de RE (religia edukado ?) de la Lernejoj Godolphin kaj Latimer.

Esperanto fariĝis unu el la plej gravaj interesoj de David en postaj jaroj, precipe liaj klopodoj por antaŭenigi la produktadon de la Esperanto-Biblio. Ĉiujare li ĝuis vojaĝojn al Esperanto-kongresoj ĉirkaŭ la mondo, kutime uzante la plej malmultekostajn trafikilojn.



*Adolf BURKHARDT kaj David FEATHERSTONE dum la kongreso en Viviers (fotis P.C.)*

David ankaŭ tre aktive partoprenis la vivon de sia eklezio - Michley Hill Chapel, kie li okupis tra la jaroj diversajn postenojn - konsilanto, sekretario, junulara gvidanto, estro de la dimanĉa lernejo, regula pianisto de komuniaj Diservoj.

Laŭ raporto de la filo Simon,
redaktis Adolf BURKHARDT

NEKROLOGO

Lennart SVENSSON naskiĝis la 9-an de majo 1930 kaj iĝis instruisto. Li estis membro de KELI ek de 1961 kaj estis unu el niaj dumvivaj membroj.

. En Gostyń li lastfoje partoprenis ekumenan kongreson. En la klubo de Ljungby li estis membro kaj ankaŭ en la asocio por la hejmregiono. Dum la lastaj du jaroj li suferis pro kancero.

La 14an de aprilo li mortis kaj estis entombigita la 26an en la preĝejo de Torpa. Li havis fraton Erik Modalen kaj estas funebre memorata de la Esperantomovado kaj KELI.

Arne LUNDKVIST

## Vortserĉludo

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| E | B | I | O | K | U | L | E | N | O |
| D | E | J | U | D | A | S | O | S | R |
| Ŝ | D | Z | L | A | R | M | P | M | T |
| O | H | E | G | V | E | I | Ĵ | A | E |
| K | E | O | Z | L | L | Ĉ | S | T | P |
| R | J | Ĝ | I | A | P | N | G | E | A |
| A | D | F | K | U | K | T | C | O | U |
| M | L | O | N | G | O | M | A | N | D |
| A | P | O | B | O | K | A | J | E | D |
| A | L | T | I | T | O | Ŭ | B | R | F |

En tiu vortserĉludo estas kaŝitaj 10 libroj de la Nova Testamento. La nomoj troviĝas horizontale, vertikale aŭ ankaŭ diagonale en la diagramo. Ili povas parte koincidi aŭ esti skribitaj returne.

Fritz LAUTENBACH

### Solvo de la krucvortenigmo 833

**horizontale**: 1. Kristnasko, 9. serene, 10. Nb, 12. miri, 13. et, 14. fiŝo, 16. ombro, 18. ili, 19. analog′, 20. rinito, 22. edr′, 23. moder′, 24. skia, 25. an, 26. sirt′, 27. ef′, 28. akacia, 30. instrukcio.

**vertikale**: 1. konfirmaci′, 2. is, 3. semo, 4. tri, 5. Nerono, 6. anima, 7. se, 8. ortografio, 11. bilion′, 13, erodie, 15, sind′, 17. blek′, 19. atriar′, 21. IESKT, 24. stik′, 28. As, 29. Ac.

**kromsolvo**: fresko.

# Homaj rajto kaj devo

Konscienco kaj Pac-Imposto Internacia (CPTI) intencas pledi ĉe Unuiĝintaj Nacoj pri tio, ke la rajto rifuzi militcelan pagadon estu homa rajto. Jen la teksto, kiu en aprilo 2002 eniros la kunvenan tagordon de UN-Komisiono por Homaj Rajtoj.

## Homa rajto ne kunpagi por milito kaj homa devo pagi por paco

1. Homoj mortigantaj estos persekutataj, tiel oni povas legi en la leĝo de preskaŭ ĉiu lando. Kaj ankaŭ tiu, kiu pagas al aliaj por mortigi, estos leĝe persekutata. Tiumaniere la fundamentan rajton je vivo de ĉiu homo protektas la leĝo.

2. Unuiĝintaj Nacioj agnoskas la rajton de ĉiu homo surbaze de konscienc-riproĉoj rifuzi militservon kiel leĝe fiksitan konkretan esprimiĝon de la rajto je penslibereco, konscienco kaj religio.

3. Kvankam multaj ŝtatoj agnoskas ĉi tiun rajton rifuzi militservon kiam malpermesas la persona konscienco, ili trejnas kaj prizorgas soldataron helpe de impostoj, kiujn kontribuadas iliaj civitanoj. Tiele konscienc-riproĉulo povas rifuzi militservon, t.e. esti libera de la devo ekzerci por kaj partopreni en la mortigado de homoj, sed la sama persono restas devigata kunpagi al la partopreno flanke de aliaj en la mortigado de homoj.

4. CPTI estas internacia unuiĝo de homoj, kiuj neniel povas subteni iun ajn penon kaj klopodon prepari militon aŭ ekzerci en la mortigado. Niaj konsciencoj tion ne permesas al ni. Eĉ se oni permesas al ni liberiĝi el la devo preni personan parton de la pormilita aparato, oni tamen nin devigas partopreni en la militpotenco kontribuante nian imposton. Ni tute ne neas la ŝtatan rajton postuli kaj kolekti impostojn de siaj civitanoj. Sed ni asertas ke, per elspezo de nia imposta mono al milito kaj militprepado, ŝtatoj nin faras komplicaj al la mortigado de homoj.

5. Laŭ la juĝo de CPTI tian individuan respondecon eksplicite mencias artikolo 6 de la Nürnberg'a Ĉarto. Ĝi tekstas: „Gvidantoj, organizantoj, instigantoj kaj komplicoj, kiuj surpaperigante aŭ plenumante partoprenas en komunaj plano aŭ konspiro fari iujn el la antaŭmenciitaj krimoj, responsas pri ĉiuj agoj faritaj de personoj kadre de tia plano”. CPTI opinias ke impostpaganto havu la rajton ne kompliciĝi rilate al la uzo de mortiga perforto kaj la mortigado de kunhomoj.

6. Antaŭ nelonge U.N. proklamis la unuajn dek jarojn de la nova jarmilo Internacia Jardeko por Kulturo de Paco kaj Senperforto favore al la Infanoj de la Mondo. CPTI deziras emfazi ke la rajto ne kunpagi al milito kaj militpreparado fariĝu integra parto de la deziro de la impostpaganto akceli kaj promocii pacon. Kvankam CPTI agnoskas, ke apartenas al la strukturo de demokratia decidiĝo de ĉiu ŝtato difini kiel kolektitaj impostoj estu elspezataj, ĝi deziras rimarkigi, ke la buĝeto de militcelaj elspezoj estas kelkfoje pli granda ol la monkvanto kiun la ŝtatoj destinas al civilaj aktivaĵoj, celantaj ekkonstrui pacon.

7. Tial CPTI opinias, ke la rajton de ĉiu konscienca rifuzanto de impostoj militcele uzataj ĉiu ŝtato agnosku. Ĝi sekve alvokas la UN-Komisionon por Homaj Rajtoj agnoski la konscience bazitan rajton kontraŭ pormilita uzado de imposta mono kiel laŭleĝan konkretan esprimiĝon kaj manifestiĝon de la rajto je penslibereco, konscienco kaj religio.

tradukis Jacques Tuinder